

Stine Andresen,  
Tagmeza trankvilo  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Varmegas sub tagmeza sun<sup>‘</sup>,  
trankvil<sup>‘</sup> surkampe regas nun;  
alaūd<sup>‘</sup> ne kantas en aer<sup>‘</sup>,  
enherbe songas ĝi sur ter<sup>‘</sup>.<sup>2</sup>

Abel<sup>‘</sup> ne zumas ie ĉi,  
ĉe flor<sup>‘</sup> ne flirtas papili<sup>‘</sup>;  
la vent<sup>‘</sup> sub floroj dormas jen,  
perdrikoj kaŭras en la gren<sup>‘</sup>.

Sub poplo ĉe la vojo-rand<sup>‘</sup>  
pro lac<sup>‘</sup> kuſigis sin migrant<sup>‘</sup>;  
la arb<sup>‘</sup>, en silka vesto, sin  
ne movas, por ne veki lin.

*Traduko de la Germana poemo “Mittagsstille” de STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, \*1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1985-05.*

MR-185-3a / Arg-321-651 (2005-08-26 09:38:44)

*La poetino vivis en Wyk aur la norda-frisa inaulo Föhr, estis edzino de muelisto, verkis krom la nordafrisa poemo “Swet hiamelk-haid” precipe poemojn en la germana lingvo.*

Stine Andresen,  
Mittagsstille

Die Sonne steht im Mittagskreis,  
Im Felde ist's so still, so heiß;  
In Lüften hoch kein Vogellaut,  
Die Lerche träumt im Heidekraut.

Kein Bienlein summt, kein Käfer schwirrt,  
Kein Schmetterling um Blumen irrt;  
Der Wind schlält unterm Blütendorn,  
Die Roggenmuhme hockt im Korn.

Die Pappel selbst am Wegesrand  
Hebt kaum ihr seidenes Gewand,  
Daß kein Geräusch den Wandrer weckt,  
Der sich in ihrem Schatten streckt.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, \*1849-12-23 – †1927-05-13).*

*Arg-321-650 (2005-08-26 09:25:53)*

*Die Dichterin Dlebte in Wyk auf der nordfriesischen Insel Föhr, war Ehefrau eines Müllers, schrieb außer dem friesischen Gedicht “Swet hiamelkkaid” (= Süße Heimlichkeit) hauptsächlich Gedichte in hochdeutscher Sprache.*

---

<sup>2</sup>aū:  
ne kantas bird<sup>‘</sup> en la aer<sup>‘</sup>,  
enherbe songas sur la ter<sup>‘</sup>.